

Johann Wolfgang von
Goethe,
Heidenröslein

Johann Wolfgang
von Goethe,
Knab' rozeton
vidis li

*tradukita de Joachim
Gießner*

Johann Wolfgang
von Goethe,
Roz' sur erike-
jo

*tradukita de Konrad
Matheus*

Johann Wolfgang
von Goethe,
Dornrozeto

*tradukita de Kálmán
Kalocsay*

Sah ein Knab ein Röslein
stehn,
Röslein auf der Heiden,
War so jung und mor-
genschön,
Lief er schnell, es nah zu
sehn,
Sah's mit vielen Freuden.
Röslein, Röslein, Röslein
rot,
Röslein auf der Heiden.

Knab' rozeton vidis li;
erikeja floro.
Juna, bela estis ĝi.
Por admiru kuris li
ĝoje kun adoro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Vidiĝis eta ruĝa roz'
de knab', sur erikejo.
Ĝi belis en matena
ros'.
Hastis li al juna ŝos'
admiru ĝin kun
ĝojego.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Vidis knab': Jen, ju-
na flor'!
Rozujet' kampara!
Bela, kiel la aŭror'!
Li alkuris ĝoje por
Vidi, kiel kara!
Rozo, rozo, ruĝa
roz',
Rozujet' kampara.

Knabe sprach: „Ich bre-
che dich,
Röslein auf der Heiden!“
Röslein sprach: „Ich ste-
che dich,
Dass du ewig denkst an
mich,
Und ich will's nicht lei-
den.“
Röslein, Röslein, Röslein
rot,
Röslein auf der Heiden.

Diris knab': „Mi rom-
pos vin,
vi rozeta floro.“
Diris roz': „Mi pikos
vin,
ke vi ne forgesos min,
premas min doloro.“
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rom-
pos vin,
rozo sur erikejo.“
Diris roz': „Dorn' pi-
kos vin,
por ke vi ne forgesu
min.
Al mi ne estu sufero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Diris knab': Mi volas
vin,
Rozujet' kampara.
Diris roz': Mi boras
vin,
Ĉiam vi memoras
min,
Pro l' dolor' amara.
Rozo, rozo, ruĝa
roz',
Rozujet' kampara.

Und der wilde Knabe
brach
's Röslein auf der Heiden;
Röslein wehrte sich und
stach,
Half ihm doch kein Weh
und Ach,
Musst es eben leiden.
Röslein, Röslein, Röslein
rot,
Röslein auf der Heiden.

Knab' sovaĝa rompis
ĝin;
erikeja floro.
Rozo ja defendis sin
kaj sufere pikis lin,
ne utilis ploro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Kaj knab' sovaĝa
rompis ĝin,
rozon sur erikejo.
En defend' roz' pikis
lin.
Sed ve' kaj aĥ' ne hel-
pis ĝin.
Venis sort' sen tolero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Knabo rozon ŝiris do
De l' rozuj' kampara,
Ĝi, defende, pikis
tro!
Sed ne helpis ve kaj
ho
Kontraŭ vol' barba-
ra.
Rozo, rozo, ruĝa
roz',
Rozujet' kampara.

...

...

...

...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).

Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)

La poemo troviĝas en <http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein>. Melodioj estas aŭdeblaŭ en <http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html>. La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.